
# BONA ESPERO



Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj de la "Subtenanta Asocio de BONA ESPERO e.V."

n-ro 15 oktobro 1985

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60
Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiroamt Dortmund: 2033-99-456

---

Augsburga surprizo! La onidiroj aŭdiĝis jam dum la kongresa dimanĉo kaj fariĝis faktoj lundvespere. Neatendite aperas Ursula kaj Guiseppe Grattapaglia en la kongresejo, ĵus alflugintaj el Brazilo kaj survoje al la maljunaj gepatroj. Tiel la amikoj de BONA ESPERO havis la unikan ŝancon, mardmatene pridemandi 3 kunlaborantojn tieajn. Ursula priskribis verve kaj entuziasmige la vivon kun la infanoj kaj la sociajn kontaktojn, Guiseppe transprenis la informadon pri teknikaj kaj agrikulturaj problemoj kaj Dr. Victor Sadler, dumtempa kunlaboranto tie, rakontis sprite kaj amuze pri spertoj de mezeŭropa urbano en grandfamilio biene izolita.

Detale ne eblas ĉion ripeti, sed en la informoj de Ursula ripetiĝas jenaj frazoj: Nia ĉiutago estas streĉa, sed ni vivas harmonie. Plej malgranda problemo nia estas malsanoj. Krom medikamentoj kontraŭ malvarmumoj (gripo gorĝinflamo), ni ĉefe bezonas metrojn da plastro. Neniam tago pasas sen ŝiro, tranĉo aŭ grato ĉe piedoj aŭ brakoj. Kaj ni ankaŭ ne forgesu la bombonojn, en tiaj kazoj ĉiam rekomendita kontraŭ-dolorigilo. Tial paketoj, kiuj krom tiaj "medikamentoj" enhavas pantalonojn, bluzojn, robojn, ne tro dikajn pulovrojn, lankovraĵojn, bebovestojn kaj ludilojn, estas ĉiam bonvenaj. Principe ludiloj estas bezonataj. Domaĝe, ke ni ne povas vidi la brilajn okulojn de knabineto, kiu ĉirkaŭbrakas sian unuan pupon, la fieron de knabo, ofte dek- eĉ dekdu-jara, puŝante sian propran etan aŭtomobilon. Kaj ne forgesu, ke ili ja havas gefratojn, kiuj ne tiom bonŝancas vivi en BE. Des pli por ili gravas ludiloj. La kontaktoj al poŝtistoj kaj doganistoj en Brazilia estas intertempe tiom bonaj, ke paketojn por BONA ESPERO oni flankenmetas kaj telefone petas la filojn de gesinjoroj Grattapaglia, preni ilin. En ilia loĝejo estas la provizora deponejo, ĝis vizito de iu bonesperano en la urbo. Post necesaj aĉetoj oni preparas la transporton jene: Unue oni avertas la busŝoforon pri rezervo de sufiĉe da spaco. Alian tagon oni ŝarĝas la aĉetojn kaj la paketojn en la buso. Sekvas la 250-kilometra reveturo, tiam la malŝarĝo en Alto Paraiso. Tie atendas, se la kaduka kamioneto bonvolis, Guiseppe aŭ Ursula por daŭrigi la transporton, se ne, iu venis ĉevalĉare kiu tiam devas kutime du fojojn veturi. Tamen, pli grava ol nova kamiono estas la solvo de la energia problemo.

"4 kilovatojn ĝi produktos ›tage," diras Guiseppe pri la hidro-centralo, planita por la venonta jaro. Ekzistas ŝanco ricevi la aparataron senkoste sed necesus ĉ. 5000,-gm por la instalado. Intertempe certaj, ke la bonesperanoj povas mem nutri sin, ni decidas ŝpari, por financi unue tion kaj poste novan aŭ bone konservitan kamioneton.

Aldone la membroj de la societo BONA ESPERO trovas inviton kaj tagordon por la jarĉefkunveno kun novelektoj, la 2.11.85 en Münster. Ĝi okazas kadre de la VESTFALIA AŬTUNO, kultura semajnfino kun teatraĵo ludita de TESPA - Parizo, kanzonistoj Gian-Franco Molle kaj Guido, ekskursoj al kastelo Hülshoff kaj Rüschhaus, k.a. Volonte ni sendas apartan programon.

Kompreneble la plej multaj el vi ne bezonas la poŝtpagilon. Sed antaŭ ol ĵeti ĝin en la paperkorbon pripensu, ĉu vi ne povas pludoni ĝin.

Ĝis revido en Münster!

Inf. 16 venos komence de jan. 86 kun la kvitanco por pagoj dum 1985

resp.: Margret Brandenburg
Brinker Damm 24, Tel. (02504) 8369
D 4403 Telgte

# Förderverein "BONA ESPERO" e. V.

**Gegründet am 24.03.1981**
**Eingetragen unter Gem V 1028 - Finanzamt Münster-Stadt**

Liebe Mitglieder und Freunde!

Am 2. Nov. 1985 findet um 16.00 Uhr im Begegnungszentrum DIE BRÜCKE Wilmergasse 4 (Nähe Schloß, Neuplatz), die diesjährige Jahreshauptversammlung mit Neuwahl des Vorstandes statt.

Als Tagesordnung schlagen wir vor:

1. Eröffnung und Beschlußfassung über die Tagesordnung
2. Wahl eines Versammlungsleiters für die TOP 3 - 7 Margret Münster
3. Geschäftsberichte
   a) der Vorsitzenden
   b) der Kassiererin
   c) der Kassenprüfer
4. Entlastung des Vorstandes
5. Wahl einer Mandatsprüfungs- und Zählkommission
6. Wahlen zum Vorstand
   a) Vorsitzender
   b) stellv. Vorsitzender
   c) Schriftführer
   d) Kassierer
7. Wahl der 2 Kassenprüfer

Stimmberechtigt sind Mitglieder, die schriftlich ihre Mitgliedschaft erklärt haben (Beitrag bis 8. 85)

Ni kore invitas pro la ĉi-jara jarĉefkunveno kun novelekto de la estraro, la 2. 11. 1985 je la 16.00 h. en la internacia centro DIE BRÜCKE Wilmergasse 4 (proksime al la kastelo), D-44 Münster

Ni proponas jenan tagordon:

1. Saluto kaj decido pri tagordo
2. Elekto de kunsid-estro por la tagordaj punktoj 3 - 7
3. Raportoj
   a) de la estrino
   b) de la kasistino
   c) de la kaskontrolistoj
4. Senŝarĝigo de la estraro
5. Elekto de nombrad- kaj mandat-komisiono
6. Elekto de la estraro
   a) prezidanto
   b) vicprezidanto
   c) sekretario
   d) kasisto
7. Elekto de 2 kaskontrolistoj

Voĉdonrajtaj estas ĉiuj, kiuj deklaris sian membrecon skribe (kotizo ĝis 8.85)

Münster, la 30.10.85

Afable salutas